

HABIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORINO:
F-INO CARMEN NAVARRO

Nro. 76 - 1972

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



**NOVAJ PROMESJOJ EN LA
GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO**



ENHAVO

La Penso	Paĝ.	1-2
Lerta Papago	"	3-4
Katastrofa Santander	"	5
Notoj	"	6
Homan Aventuron.	"	7
Korespondado	"	8
La influo de la autom.	"	9-10
Paska Kultura Semajno.	"	11-12



=====

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.J.S. escepte en okazo de oficiala Komunikio; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

-/-/ LA PENSO /-/-

Mi ne estas kolektanto de frazoj, sed iam mi trovas kelkajn kiu restas en mia memoro. Ekzemple tiu-ĉi kiu figuras kiel devizo por studentoj en la pordego de la svedaj universitatoj.

Svedujo, Ĉinio aŭ Egiptujo Jaro 1972, jaro 3.000 aŭ 236 antaŭ Kristo.

Loko, momento ne gravas ĉar la frazo pluiras homojn kaj epokojn.

"Pensi libere estas granda aĵo sed pensi juste estas plu granda aĵo".

Ni scias ke la plej rapida estas la penso.

Homa estaĵo povas esti mallibera en mallarĝa Karcercelo kaj tie li fiksita per katenoj, siaj

okuloj vinditaj siaj oreloj kovritaj, sia buŝo sig elfermita.... tamen kiamaniere ni atingas enkateni gi sian penson ?.

Gi (la penso) foriras laŭvole, ĝi imagos, ĝi memoros, ĝi amos aŭ ĝi suferos. Gi nur, la penso, jam ke la homo dormas jam ke la homo maldormas.

Kaj la penso, tial ke ĝi estas la plej mirinda homa kapableco devas esti libera. La homo (maturo homo) devas havi formatan opinion laŭ sia persona rimarkado de la mondo kaj ĝiaj problemoj. Kaj ekde tie agi laŭ konsilo de sia penso.

Sed por esti tute libera la penso ne devas esti influata de aliaj pensoj, de aliaj pensoj. Ni akceptas la neevitablan influon de la historiaj faktoroj, de la sociaj aŭ familiaj medioj, de la edukado eĉ de la raso aŭ nacieco.

Sed ni devus eviti la personan influon. Per sono kiu persuadas al alia (de pli malforta karaktero) siajn proprajn ideojn povas nuligi la personecon de la dua kaj lian liberpenson.

Nun venas la dua parto: Pensi juste estas pli granda aĵo " .

Kaj jen la bela vorto: J U S T E C O .

Kiu povas meti limon inter justeco kaj maljusteco, moraleco kaj nemoraleco, korekteco kaj nekorekteco? Kiu?. Sendube la homaro, la homo, ĉiu homo. Ĉiu homo devus kompreni kie estas la aŭtentika justeco kaj ĉiam ĝin plenumi. Ĉiu homo devus scii kiu estas la vero kaj sekvi ĝin fidele. Ĉiu homo devus koni la realan moralecon kaj neniam ĝin malobservi. Ĉiu homo devus tion koni sed por ĝi devus ekzisti precizaj pensoj, pensoj puraj kaj liberaj.

Cu utopio ? Certe, tamen estus mirinda.



L E R T A

P A P A G O

Antaŭ kelkaj jaroj, mi iris en Francujon por labori en urbo staranta sur la bordo de la rivero Rhin, ĉe la germana landlimo.

Verdire, miaj konoj pri franca lingvo estis preskaŭ neekzistantaj: Bonan tagon, Sinjoro, Sinjorino, jes... Jen mia tura franca vortprovizo.

Kiel posedanto de tiel minimuma vortaro, miaj laboraj rilatoj estis vere malfacilaj. Kiaj penoj kaj klopodoj !.

Miaj francaj laborkunuloj ridis ĝis larme aŭskultante la mostraĵojn kiujn mi elirigis el la buŝo. Ili asertis ke Molière aŭdante min baraktus malespere en sia tombo dezirante eliri kaj sufoki min pro atenco kontraŭ la gramatiko.

Persono kiu ne povas esprimi siajn dezirojn pro lingva nekono estas pli proksima al besto ol al homo, en tia situacio mi estis. La homo estas sociema estaĵo kaj tiu kiu ne povas interkompreniĝi kun la aliaj suferas. Mi min sentis izoligita inter la homamaso, viro enkarĉerigita de la silento.

Por mildigi mian iaman malbonhumoron, mi vizitis la delegiton de U.E.A. en tia urbo por trankvile babilu kaj interŝanĝi opiniojn. La delegito estis fraŭlino, vera specimeno de tiuj maljunaj fraŭlinoj kiuj ne povante ĉasi viron en sia junaĝo kaj konduki lin en gedziĝon, nun verŝas ilian tutan amon sur la bestojn, dorlotante ilin. Ŝi havis du katojn kaj unu papagon.

Por iomete flati ŝin mi laŭdis la bestetojn: Kiel belaj!, Kiel bone zorgitaj!.... kaj aliaj komplimentojn kiujn ŝi tre ŝatis.

Kuraĝigita de tiaj gentilaĵoj, ŝi komencis rakonti la historion de "siaj etuloj", iliaj virtoj kaj mirakloj....Ho! la katoj, ŝi eksklamis: Kiel inteligentaj

amemaj, fidelaj ili estas, ĉiam karese ili rondiras min....Ĉi parolis kaj parolis pri ili kvazaŭ ĉi estus parolanta pri siaj propraj idoj.

Sed la mirindaĵo inter la mirindaĵoj estis la papago. Rigardu, ĉi diris: Kiel belkolora kaj gravmiena li aspektas majeste, ĉu ne?. Sed ne estas tiuj kvalitoj la plej rimarkindaj, ekzistas aliaj. Ĉu vi ne scias ke li parolas Esperanton?.

Mi rigardis ĉin gape, (muŝo povus esti enirinta mian buŝon tute libere) tiel surprizita mi estis.

"Jes, ĉi ripetis dum rideto dancis en ĉiaj lipoj, li parolas esperanton, alparolu lin kaj vi konvinkigos ke Zamenhof mem parolas per lia buŝo.


Mirigita, konfuzita de la troigo, sanceliĝe mi alproksimiĝis al la kaĝo kie la birdo estis: "Sinjoro, mi diris, ĉu vi parolas Esperanto?"

La papago iomete moke kaj iomete strabe rigardis min kaj kriis :

"Stultulo, ne manĝu la akuzativon ! "

.....

Kara leganto ĉi vi neniam sentis la deziron esti en glutita de la Tero?. Tio okazis al mi en tiu momento. Nun, kiam mi volas paroli esperante mi rigardas ĉirkaŭ mi por vidi, ĉu papago aŭskultas mian paroladon.




M I G R I N T O
=====

4

K A T A S T R O F A

S A N T A N D E R



Estis la 3-an de novembro 1893. Poste nia konata verkisto José M^a Pere da rakontis la bruladon sur la ŝipo "Cabo Machichaco", la sekvan eksplodon de 60 tunoj de dinamito kaj la finan brulegon de urba kvartalo. Entute estis pli ol 400 personoj mortaj kaj pli ol 1000 vunditaj. Malaperis ĉiuj aŭtoritatoj, ĉar ili estis rigardante la fajron kaj celante estingi la incendion sur la triste fama "Cabo Machichaco".

Sed estas alia pli konata tago, pli bone nokto, la tragedia nokto de la 15/16-an de februaro (1941), kiam forte ga vento estis sur Santander, suda ven to, kaj kiam komenciĝis la unua fajro jam oni timis pri eta katastrofo. Baldaŭ ekflamiĝis la malnova katedralo, kiu disdonis fajrerojn tra la antikva urbeto kaj la brulego tiam estis iom ne

imagebla, do jam estis neeble eviti la detruon. La celoj do direktis savi ĉion valoran. Santander, sen eblecoj komuniki sian propran malfeliĉon al la lando, faris ĉion por gajni la batalon, sed ne estis unu kontraŭo, ĉar unu iĝis fajro kaj vento, kaj la fina rezulto estis la detruo de 376 konstruaĵoj. La unua fazo de la incendio daŭris 43 horojn kaj la dua 72 horojn. Partoprenis 211 fajrestingistoj kaj nur mortis unu persono, madrida fajrestingisto, kaj tiu kuraĝulo ankoraŭ nun meritas nian omaĝon: Julián Sánchez estis lia nomo. Malaperis 32 stratoj, kaj 185 komercoj fermis la pordojn.

Nu, kial mi rememoras tiujn tagojn por ni vere dramatikaj?. Ĉar estis alia belega vespero, dimanĉo, ne estis vento, do la tago ŝajnis feliĉa, sed alia fajrero farigis gravan brulegon, estis en la Palaco de Macho, jam okdekjara konstruaĵo, kiu situis stratege apud malnovaj domoj. Kiel antaŭe, la fajreroj flugante tra la aero,

saltis baroj kaj falis sur la platan tegmenton de la fama teatro de la Placo Porticada kaj ekflamigis alian brulegon kiu detruis pli ol mil seĝojn kaj preskaŭ la tutan tegmenton. En tiu momento ĉiuj memoj rememoris la elstaran incendion de 1941 kaj timis ke se aperus vento Santander rezultus detruiĝita.

Tiam ni petis helpon al la fajrestingistoj de Torrelavega kaj Bilbao, kies sindonemo ni kore dankas, kvankam ni venkis fine la brulegon. Nur krom la menciita detruo en la teatro, rezultis detruata unu konstruaĵo kun kelkaj gravaj komercaj entreprenoj.

JUAN AZCUENAGA
(Santander)

N O T O J

POR FACILIGI NIAN TASKON, SENDU
VIAJN ARTIKOLOJN ESPERANTE.

NI APENAŬ HAVAS TEMPON POR ENTREPRENI
TRADUKADON.

La Redakcio

.....
D O N A C I O J
=====

Antonio Costa	25 Ptoj.
Katalunano	300 "
Dana S-no.	200 "

La homo ĉiam serĉas aventuron. La desirogo scii, koni puŝas lin de la komenco de la homaro al la nekona taĵo; al la solvo de la demandoj kiuj oni prezentis al li. Tiel tago, unu el la prahomoj sentis scivolemon pri kio estus trans tiu akvetendado je kies bordo staris sian domon kaj la rimarkado de trunko flosante sur la akvo donis al li la ideo utiligi ĝin por atingi sian celon. Li enŝipiĝis al la nekonataĵo.

Antaŭ li malfermigis misteran mondon pri kiu nenien li konis. Li eĉ ne sciis se estus ion en la alia flanko aŭ se tio estus la fino de ĉio. Sed sia scivolemo estis pli forta ol sia timo.

Tiamaniere, iom post iom, la homo malkovris la mondo loĝata de li.


Ĝi estis laboro de jarcentoj kiu ne finis. Ankoraŭ ekzistas en nia planedo multaj neeksplorataj lokoj pri kiuj malmulte aŭ nenion ni konas. Kaj ne estas necese iri al la profundaĵoj de la tero aŭ de la oceano por ke ni trovu tiujn misterojn. Tie ni havas en la supraĵo la silvo Amazonas, la montoj Himalaya kaj tiom da nekonataj lokoj de Afrika.

Tamen sen ĉesi en tiu-ĉi serĉado, la aventuro de la homo donis gravan turnon kaj samtempe ke grava, eble el la plej spektindaj: la konkero de la spaco, kiu komencis per la historia flugo de la fratoj Wright, signifis la atingo de unu el la plej antikvaj revoj de la homaro post la Konkero de la maro.

Jam la homo metis la piedo sur la luno kaj nun la vojaĝoj de la astronautoj al la luno saĝnas al ni la plej natura kaj facilaj aĵoj de la mondo.



LA
INFLUO DE
LA AUTOMOBILO
AU LA
MODERNA



ESPRIMMANIERO .

Ks la moderna vivo alportas al ni novajn konceptojn pri aĵoj kaj personoj estas evidente, kaj ke la nuntempa homo ne povas paroli aŭ utiligi la saman esprimmanieron kiel la unuaj terloĝantoj, la nomataj kavernhomoj, ankaŭ estas konstatebla fakto.

La tasko estas scii, ĉu ni antaŭen iras laŭ kultura vidpunkto aŭ ĉu ni restas sur la sama loko kiel niaj praaĵoj. Eble pro la fakto ke ni ĉirkaŭas nin per multaj kaj diversaj maŝinoj la parolmaniero ne estas la sama ol tiu de la unuaj homoj sur la terĝlobo.

Mi ne scias, en tiu epoko de la prahistorio, en kiu por havigi fajron, pacience oni devis froti lignaĵon kontraŭ lignaĵon, kiel nomiĝis la gejunuloj, kiajn alvoknomojn kaj familiajn nomojn ili havis.

Nu, jen kiel konversaciis kelkaj gejunuloj alvenintaj per aŭtomobiloj apud kafejo, kie mi tutintence gapi dis por ilin observadi.

De aŭtomobilo elsaltis junulino. Du junuloj kiuj staris sur la trotuaro salutis ŝin jene; Kiel vi fartas "Seat 600"? Ŝi respondis: bone, ĉio funkcias bone inkluzive la bremsiloj. Ŝiavice ŝi demandis: Kaj vi "Seat 124" kaj vi "Morris 1.000" ĉu via stato estas bona? .

Jes, respondis samtempe la du junuloj, ni jam riparis la direktilojn, ili aldonis.

Mi, kiel scivolema vilaĝano pliproksimiĝis al la

grupo kaj jen kiamaniere ili interbabiladis. Ne, diris unu el la du junuloj, "Renault L-8" kaj "Simca 1000" eble ne venos, ĉar vi jam scias ke "Renault L-8 tre amindumas "Simca-n 1000" kaj sendube ili preferas iri solaj.

Tamen, intervenis la alia junulo, venos mia nova amiko "Porsche". Jes, komentariis la junulino, mi jam deziras "lin" koni, ĉar oni diras ke "li" aspektas belege kaj ke la motoro estas perfekta, senkompara.

En tiu momento haltis apud ili, ankaŭ apud mi kompreneble, aŭtomobilo en kiu troviĝis nur juna ŝoforino. Ĝian alvenon oni komentariis jene: Salutojn al nia plej juna amikino "Renault 12, B.0032-H" . Ankoraŭ alvenis aliaj du junuloj kaj du junulinoj, kiuj estis salutataj je simila maniero. Ili eniris kafejon kaj mi kiel bona vilaĝano plidaŭrigis mian surstratan promenadon.

La aŭskultita parolmaniero tre pensigis min kaj mi eltiris la jenan konkludon. Ni iom progresis, ĉar mi supozas ke niaj praavoj, la kaverloĝantoj sendube nomigis "Ligno Verda", "Piediranto", "Rapida Arbo", "Veturanta Ligno" k.t.p. . Poste ni ĉiuj scias ke venis la hindoj kun "Ĉevalo Blanka", "Brava Taŭro", "Nigra Aglo" k.t.p. . Nu, nun venas la "Simca", "Renault", "Seat" k.t.p., kiel spegulo de nia progreso.

Eble niaj nepoj ne plu nomigos Paolo, Petro, Maria, Jozefino k.t.p., ĉar diru al mi, kio okazos se geedziĝas "Renault L-8 kaj Simca 1.000" ?, kiel estos nomataj iliaj idoj ? .



LUIS SERRANO PEREZ

(SABADELL)

10

La Paska Kultura Semajno 1972 okazinta en la Kastelo de Grésillon (Francio) de la 3^a ĝis la 9^a de aprilo, ne estis la unua kiu okazis, ĉar, ĉiujare, en tiu kastelo, la Esperantista Kulturdomo, okazas Paska Kultura Semajno, ĝis nun organizata de Unuiĝo Franca por Esperanto.



Sed ĉi-jare, la Paska Kultura Semajno estis organizata de Junulara Esperantista Franca Organizo, la junulara sekcio de U.F.E. kaj ambaŭ la Franca sekcio de T.E.J.O. la rezulto estis la juneco kaj la allogeco de la etoso, kontraŭe al la antaŭaj Kulturaj Semajnoj dum kiuj la Kastelo ŝajnis ripozejo por maljunuloj. Imagu 60 gejunuloj (el kiuj 15 eksterfrancaj) kiuj plenigas la kastelon kaj partoprenas junetosan aranĝon.

Kiel kutime, matene okazis trigradaj kursoj, por lerni la lingvon aŭ perfektigi siajn konojn pri la lingvo. Komence de posttagmeze, la tempo estis libera. Oni povis ludi tablotenison, promeni sur la lageto per barko, promeni ĝis la apuda urbeto, aŭ tutsimple, resti en la granda salono de la kastelo por babili esperantlingve kun samaĝuloj el aliaj landoj. Fine posttagmeze, okazis forumaj diskutoj pri la temo: "Kien evoluas la Mondo?". Estis pritraktitaj fakaj temoj: lingva aspekto, politika aspekto, scienca kaj teknika aspekto, k.t.p. pri kiuj ĉiuj fakuloj povis sin esprimi kaj trovi intereson.

Vespere, okazis la plej junularaj aranĝoj: Apudfajra Vespere: por la unua fojo, oni uzis la kamon de la granda salono por ekbruligi belan lignofajron. Ĉirkaŭe, kelkaj partoprenantoj montris siajn talentojn ludante sur gitaro, kantante, ludante sur piano, aŭ rakontante historietojn. Oni haltigis la elektran lumon kaj eklumigis kandelojn. Je la fino de la vespero, oni rostis panerojn per la fajro. Balo: por la unua fojo, okazis balo en la kastelo. Oni kunportis imponan materialon diskturnilojn kaj

tre laŭtajn sonaparadojn, kolorajn lumilojn por krei taŭgan kaj modernan etoson. Ne temis pri balo por si demuloj, kiel oni kelkfoje povas iujn renkonti en Universalaj Kongresoj.....

Konjaka Vespero: Por la unua fojo, oni disdonis alkoholaĵon senpage (oni tamen kontrolis la kvanton nur la gajeco estis tolerata kaj eĉenkuraĝigita, ne la ebrieco). Kiel dum la apudfajra vespero, ĉiu partoprenis, prezentante sian numeron. Du tagoj antaŭe, la fajro estis tiel bela, ke oni referis ĝin dum tiu konjaka vespero. Morgaŭe, oni organizis amuzajn ludojn, referante denove la fajron kaj trinkante la restaĵon de konjako.

Ni menciuj ke oni starigis trinkejon, por la unua fojo en la kastelo, kaj ke dum la tuta restado, ĉiu partoprenanto povis tie aĉeti senalkoholan trinkejon.

Tiun Kulturajn Semajnon partoprenis ankaŭ 10 aŭ 15 aŭ eble eĉ 20 nejunuloj. Sed ĉu ili malhelpis nin? Absolute ne. Iuj estis je nia flanko, aprobante tiun reunigon de la kastelo, kaj amuziĝante kun ni, kiel ge-junuloj; ili estis spirite junaj.

La aliaj estis devigitaj sekvi la movadon; ili konstatis la intereson de tiu junigo; se iuj ne estis kontentaj, ili nenion povis diri, pro la sukceso mem de la renkontiĝo. Sed kiu povis esti malkontenta pro tiu renovigo de la Kulturaj Semajnoj ?



JEAN PIERRE LAURENTI

